

La Nobel-premiitoj : Centa datreveno de la naskiĝo de la Nobel-pacpremiito Albert Schweitzer

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 589, 1975.01.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La jaro 1975 markas la centan datrevenon de la naskiĝo de Albert Schweitzer, tiu Nobel-pacpremiito mondfamiĝinta ne nur pro sia filantropa aktiveco ĉe la hospitalo Lambarene en Gabono, sed ankaŭ pro siaj teologiaj kaj filozofiaj verkoj, pro siaj muzikologiaj studoj, pro siaj orgen-konzertoj, pro sia kuracista sinteno kaj fine pro sia oratora talento, kiun li metis je la servo de la defendo de la vivo kaj de la paco ĝenerale.

A.- Ni festos la jubileon Albert Schweitzer turnante nian atenton al la laboro kaj penso de la Nobel-pacpremiitaro. En tiu pacpremiitaro la kuracisto de Lambarene okupas ĉeflokon.

Cl. Ni memorigas, ke la sveda kemiisto Alfred Nobel (naskiĝo: 1833; morto: 1896), estas la inventinto de diversaj eksplodiloj, inter kiuj la dinamito. Pertestamente li dediĉis sian enorman riĉaĵon al la ĉiujara ripetata disdono de kvin gravegaj premioj.

A.- Tri premioj havas kiel celon la rekompencojn de sciencistoj, kiuj faris decidigan malkovron aŭ inventon en fiziko, kemio kaj medicino aŭ fiziologio.

Cl.- La nombrado de la Nobel-premiitoj pri filozofio, kemio kaj medicino laŭ ilia nacieco reliefigas la eksterordinaran sciencan gravecon de tri landoj : Usono, Britio kaj Germanio. En la scienca serĉado tiuj landoj ludis pioniran rolon dum la unua duono de la dudeka jarcento.

A.- Usono, Britio kaj Germanio kune havas 63 procentojn de la Nobel-premiitoj pri fiziko, 72 procentojn de la Nobel-premiitoj pri kemio kaj 60 procentojn de la Nobel-premiitoj pri medicino.

Cl.- Jen kiel viciĝas la nacioj, kiam oni adicias laŭ ilia nacieco la Nobel-premiitoj pri scienco :

A.- Unuarange troviĝas Usono kun 72 Nobel-premiitoj pri fiziko, kemio kaj medicino.

Cl.- Sekvas kun po 46 premiitoj Britio kaj Germanio. Francio havas 21 premiitojn. Po 9 premiitojn havas Aŭstrio, Nederlando, Sovetio kaj Svedio. Je la naŭa loko troviĝas Svislando kun 7 premiitoj. Po 5 premiitojn havas Danlando kaj Italio; 3 Hungario; po 2 Belgio, Ĉinio, Japanio kaj Kanado; fine po 1 Nobel-premiiton pri scienco havas Argentino, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Hindio, Hispanio, Irlando, Portugalio kaj Sudafriko.

A.- Kvara premio honoras verkistojn, kies verkaro respegulas idealon noblan kaj sinceran. Havas plej multe da Nobel-premiitoj pri literaturo Francio: 11 premiitojn. Sekvas Britio kaj Usono kun po 6 premiitoj; Germanio kaj Svedio kun po 5 premiitoj; Italio 4 premiitoj; Danlando, Hispanio kaj Sovetio: po 3 premiitoj; Pollando kaj Svislando: po 2 premiitoj; fine havas po unu premiiton pri literaturo Belgio, Ĉilio, Finnlando, Hindio, Islando, Izraelo, Irlando, Jugoslavio, Grekio, Gvatemalo kaj Norvegio.

Cl.- Esperantistoj opinias, – inter ili Edmond Privat – ke en la aljuĝo de la premio pri literaturo ludas ĉefrolon la lingvo mem, en kiu verkas la aŭtoroj. Oni rimarkas fortan

okcidentan centrismon, kiu ludas malfavore al la premiado de aziaj aŭ afrikaj verkistoj, kiuj esprimiĝas en lingvoj nekonataj en Skandinavio.

A.- La kvar unuajn premiojn aljuĝas svedaj institucioj. Kontraŭe la kvinmembran Nobel-Packomitato elektas la norvega Parlamento. Tiu komitato havas sian sidejon en Oslo. Ĝi estas helpata en sia laboro de la Norvega Nobel-Instituto, kie laboras konstantaj funkciuloj okupiĝantaj pri internacia juro, politika kaj ekonomika historio kaj pri la redaktado de jarraportoj. Tiu Instituto eldonas revuon, organizas kursojn por ĵurnalistoj, disdonas stipendiojn al studentoj, organizas konferencojn kaj prizorgas riĉegan bibliotekon, kie estas registritaj pli ol 60'000 libroj en rilato kun pacismo, intenaciismo kaj aliaj fakoj.

Cl.- La Nobel-Packomitato neniam pravigas siajn elektojn. Ĉiu elekto de Nobel-pacpremiito ĝenerale vekas kritikojn kaj eĉ disputojn. Ne donante la kaŭzojn de la elekto, la Nobel-Packomitato restas ekstere de la debatoj, kiuj tre ofte havas politikan karakteron.

A.- Jen kiel viciĝas la landoj koncerne la nombron de Nobel-pacpremioj. Okupas la unuan rangon Usono kun 13 premiitoj. Sekvas Francio : 8 premiitoj ; Britio : 7 premiitoj ; Svedio : 4 premiitoj ; Belgio, Germanio kaj Svislando : po 3 premiitoj ; Aŭstrio kaj Norvegio: po 2 premiitoj; fine havas po 1 premiiton Argentino, Danlando, Italio, Kanado, Nederlando kaj Sudafriko.

Cl.- 11-foje organizaĵoj ricevis la Nobel-pacpremion, inter ili dufoje la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco, kies sidejo troviĝas en Ĝenevo.

A.- Post tiuj enkondukaj statistikoj pri la Nobel-premiitoj alvenas la momento prezenti la vivon kaj penson de la pacpremiitoj. Tion ni faros dum la venontaj semajnoj.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!